

ILEI-se: Jarkunsido

Lesjöfors, 2007-05-19

1. Malfermo

Malfermis Siv.

2. La demando de la ĝusta sciigo pri la kunveno

Ĉu la kunveno estas enorde anoncita? La kunveno opinias ke jes.

3. Elekto de kunvenresponduloj

Ni elektis:

- Martin Stridh kiel prezidanto,
- Carl Mäsak kiel sekretario,
- Agneta Emanuelsson kaj Ulla Luin kiel aprobantoj.

4. Jarraporto

La jarraporton laŭtlegis Siv Burell. Post iuj da komentoj de Gunnar Olsson kaj Wim Postuma, ni kune akceptis la jarraporton.

5. Ekonomia raporto

La ekonomian raporton priskribis Bo Hedberg, helpate de Siv Burell. Ni akceptis la ekonomian raporton.

6. Revizora raporto

La revizoran raporton laŭtlegis Britta Rehm. La kunveno akceptis ĝin.

7. Senŝarĝigo

La kunveno senŝarĝigis la malnovan estraron.

8. Elekto de novaj estraranoj

Ni plenigis la sekvajn postenojn:

- Prezidanto: Siv Burell, por unu jaro.

- 4 estraranoj: Inga Johansson kaj Siv Sjögren elektiĝis por du jaroj. Noto por la protokolo: Fredrik Olofsson kaj Bo Hedberg elektiĝis en la jaro 2006 por du jaroj.
- 2 anstataŭantoj: Ragnhild Berglund elektiĝis por du jaroj, Ralf Jalming elektiĝis por unu jaro.
- 2 revizoroj: Anita Dagmarsdotter kaj Britta Rehm.
- 1 anstataŭanto de revizoro: Ann-Louise Åkerlund.
- Rerezentantoj al internacia ILEI: Gunnar Olsson kaj Wim Posthuma.
- Rerezentantoj al Sveda Esperanto-Instituto: La kunveno lasis al la estraro fari decidon.
- Elektoprepara komitato: La kunveno reelektis la lastjarajn komitatanojn Birgitta Anevik (kunvokanto) kaj Gunnar Olsson.

9. Membrokotizo

La kunveno decidis ke la membrokotizo estu por unu jaro 225 SEK.

10. Ceteraj aferoj

Legis la gvidliniojn por la venonta jaro Siv Burell. Distribuis ankaŭ Siv foliojn pri okazonta esperantokurso en Mullsjö. Rakontis ankaŭ Siv pri planitaj aŭtunaj kursoj universitataj. Bengt-Olof Åradsson kaj Carl Mäsak komentis iomete, kaj poste Siv dankis al forirantaj estraranoj: Kaisa Hansen kaj Margareta Andersson.

11. Fino de la kunveno

Finis la kunvenon Martin Stridh.

La protokolon skribis Carl Mäsak

Atestis Agneta Emanuelsson

Atestis Ulla Luin
